# TEA-BULTENO

25ª JARO - N° 164 NOVEMBRO - DECEMBRO N. 11-12/2022


Lingvo absolute logika kaj tute sena je propraj karakterizoj estus lingvo senviva kaj tro peza.
*Ludoviko Lazaro Zamenhof (1859-1917)*


## Saluton al mia kara Legantaro!

Jen denove sin prezentas al vi la TEA-Bulteno, kiun vi ne ricevis de jam pluraj monatoj. Multas la kialoj de ĝia malapero, pri kiuj mi ne deziras vin ĝeni. Mi varme esperas, ke iom post iom ĝia aperritmo ree iĝos pli regula, kiel en la pasintaj jaroj.

Rapide alproksimiĝas la jarfino, fino de jaro ne tiom pozitiva por la tuta mondo. Ĉiaspecaj malbonaĵoj trafis nin ĉiujn, sed ni perdu nek esperon nek fidon je pli trankvila estonteco. Ĉiam antaŭen ni iru, neflankiĝante...

Venontmonate, laŭkutime, la atento de la samideanaro estos direktita ĉefe al L. L. Zamenhof, okaze de lia naskiĝdatreveno, je la 15ª de decembro. Cent sesdek tri jaroj jam pasis de tiam, sed la memoro pri li ĉiam ĉeestas en niaj koroj. Ni festege lin honoru!

Tial mi deziras omaĝi lin pere de interesa intervjuo, kiu estis publikigita en la dua numero de la revuo *Tra la Mondo*, aŭgusto 1905. Tiel titolas la artikolo:


Doktoro Zamenhof.
« Intervjuita » (1) de AŬGUSTO MONTROSIER.

*Doktoro Zamenhof estas "la homo de l' tago". Al nia ĉefredaktoro, kiu ofte kaj intime proksimiĝis al li dum la kongreso, li bonvolis konigi siajn impresojn pri la jam pasintaj tagoj: siajn dezirojn kaj esperojn por la estonteco.*

*Bulonjo, Sabaton la 12an de Aŭgusto 1905*

*Jen finiĝis la Kongreso, kaj bone finiĝis, per la postvespermanĝo en Calais (Kaleso). Post kelke da horoj mi forveturos Parizon, kie mi dediĉos la kelkajn libertempajn tagojn miajn ankoraŭ ĝuotajn al la legantoj de "Tra la Mondo".*

*[...] Kion pli bonan mi povus fari ol kolekti impresojn de nia kara majstro. Mi do serĉas lin kaj lin renkontas [...]*

*Grava afero! Estas mia unua intervjuo, kaj intervjuo esperanta!*

*Doktoro Zamenhof akceptas min kun la mano antaŭigita kaj kun sia afabla kaj kutima rideto. Malantaŭ liaj okulvitroj, liaj bluaj okuloj, okuloj de Slavo revema kaj bona, direktiĝas al mi kaj mi admiras unu fojon plie tiun homon tiel energian kaj persisteman, malgraŭ timema ŝajno, ne altkreskan, kaj tamen tiel grandan per la genio. Tuj kiam li scias la celon de mia vizito, lia vizaĝo lumiĝas, kaj mi ne bezonus aŭdi lin paroli por senti, ke li estas feliĉa super ĉia espero.*

Z. - La rezultatoj de nia kongreso estas pleje kontentigaj: ĝi montris evidente, ke la lingvo tute ebligas libere paroladi; ankaŭ ke ĝi efektive naskas fratecon inter diversaj popoloj, por kiuj ĝi estos komuna ligilo.

*M. - Vi do estas plene feliĉa...*

Z. - Jes, kaj de l' unua tago ĝis la lasta, en Anglujo kiel en Francujo, mi vivadis en daŭra kontento.


*Je tiu ĉi momento nubeto vidiĝas sur la frunto de l' Doktoro, kiu aldonas:*

Z. - Eble, kelkaj ne estos kontentaj ĉar oni ne decidis kelkajn punktojn pri la organizado. Sed tio ĉi ne estis, nune, la ĉefa celo trafota. Tiu ĉi elmontro de nia ekzistado kaj de l' facileco de la lingvo, estas atingita pli ol mi esperis, kaj pri tio ni devas ĝoji sen malantaŭpenso.

*M. - Ĉu vi forlasis la ideon de organizado?*

Z. - Ne, ĝi evidente estus utila. Sed oni preferis ĝin forlasi, prefere ol naski malpacojn bedaŭrindajn.

*M. - Por tute forigi iajn malpacetojn, kelke da personoj opinias ke niaj estontaj kunvenoj povus esti nur dediĉotaj je tiaj aŭ aliaj festoj, prezentaĵoj teatraj kaj aliaj elmontraĵoj publikaj.*



Z. - Kompreneble tiaj elmontraĵoj estas tre gravaj; sed tamen *veraj*, plenaj kongresoj, kaj ne sole festoj, devos okazi ĉiujare dum kelke da tempo.

*Ŝajnas al mi ke venis la momento por paroli pri la lingva komitato kaj la estonta kongreso. Pri la unua punkto, la Doktoro diras nur ke, ĵus tiun ĉi ma-*

→

*tenon, li ricevis avizon ke S^ro Boirac deziras, ke D^ro Zamenhof bonvolu informi pri tio la Esperantistaron per la esperantista gazetaro. Jen do tion ni faris, kaj la legantoj de "Tra la Mondo" unuaj eksciis tiun gravan informon, [...]. Pri la komitato organiza de l' kongreso, la doktoro ne povas ion diri.*

Z. - La afero postulas longajn pripensojn, faratajn kviete kaj sen rapido. Oni ne devas atendi decidon antaŭ la monato de la Oktobro aŭ Novembro. Tiam ĝi ankaŭ estos konigata per niaj specialaj revuoj.

*M. - Ĉu, de la momento kiam oni disputis pri la lando, kie okazus la Kongreso, vi ricevis iajn montrojn pri la lando elektota?*

Z. - Nenion oficialan, sed ŝajnas ke Svisujo elvokas aprobon de multaj.

*Kaj la Doktoro, post iom da intima pripenso aldonas:*

Z. - En niaj kongresoj, la interkonsento de ĉiuj estas tute necesa. Tion mi ja diru: mi alveturis al la kongreso kun iom da antaŭtimo. Nenia malpaco, feliĉe, montriĝis; tamen, iom pro timo pri tia bedaŭrindaĵo, oni havis ian singardon kaj ŝanceliĝis libere paroli, estas tute necese, ke oni forĵetu ĉiun malpacon, kiu malutilus la Esperantistan aferon. Forĵetinte la malpacon, la atmosfero estos malpli peza, oni povos pli libere kaj utile disputi.



*Ekbruliginte rusan cigaredon kaj rigardante la fumon disiĝi en la aero, la doktoro elvokas nun pri sia vojaĝo, survoje al Bulonjo [...]. Bonegan impreson li ricevis de la vojaĝeto en Anglujon:*

Z. - Angloj ne rapide flamiĝas, sed ili estas homoj tre pripensemaj kaj ne flankiĝemaj. [...]

*Fine, la Doktoro resumas sian impreson:*

La kongreso devas forte nin kuraĝigi, ĉar nun ni havas la plej gravan pruvon por la mondo, ke sufiĉas veni al ni por interkomunikiĝi. Kaj la Esperantistoj devas penadi alkonduki multajn gastojn en niajn estontajn kongresojn por ke tiuj ĉi vidu kaj aŭdu per siaj propraj okuloj kaj oreloj, kaj konvinkiĝu, ke Esperanto ne estas utopio.

Kapitano Aŭgusto Capé-Montostier

Kion vi pensas pri ĉi legaĵo? Ĝi min emociis, vere. En tiu prezento ni renkontas nian karan Majstron, kiu sincere esprimas sian fieron pro la sukceso de la 1ª UK, dum kiu liaj duboj pri reala funkciado de la lingvo tute foriĝis kaj liaj esperoj pri l' estonteco plifortiĝis. Restas lia zorgado pri paca kunagado de la esperantistaro… Pripensu: tiu intervjuo estis farita antaŭ 117 jaroj! Via redaktanto Elda

# Antaŭ unu jarcento mortis Giacomo Ciamician

## kiu profetis la sunan energion

Antaŭ ol paroli pri lia agado, koncize mi diru kelkajn vortojn pri la kunteksto en kiu li vivis.



La maldekstra foto montras longan ŝtuparon kondukantan al kvartalo nomata *San Vito*. Je ĝia supro ĝueblas bela panoramo de la triesta golfo. La ŝtuparo kaj sekva strato honoras la memoron de Giacomo Ciamician (elp. Ĝàkomo = Jakobo; Ĉamiĉan). Origine ĝia nomo estis 'Strato de la Armenoj', atestanta la ĉeeston, en tiu urba parto, de la armena komunumo.

La Armenoj establiĝis en Triesto post la duono de 1700ª jaro precize sur tiu monteto, profitante de la proklamo de Triesto kiel sendogana haveno, decidita de imperiestro Karlo la 6ª (1719). En 1859 estis konstruitaj, de la meĥitarista, armenrita katolika kongregacio, la preĝejo kaj monaĥejo.

Ĝàkomo Ĉamiĉan naskiĝis, aŭg. 1857, en Triesto, tiam sub la aŭstria imperio, estis membro de la armena komunumo, i.a. nepo de meĥitarista pastro, studis en sia naskiĝurbo kaj poste en Vieno, por fine doktoriĝi en Giessen per disertacio pri ĥemiaj afinecoj. Dum sia viena periodo li publikigis analizojn pri la spektroj de multnombraj ĥemiaj elementoj: liaj esploroj estis cititaj de Dmitrij Mendelejev, la granda rusa ĥemiisto.

Ekde 1898 li estis membro de la Nacia Akademio de Sciencoj. En 1910 Ĝàkomo Ĉamiĉan, unua triestano, estis nomumita senatano de la Italia regno. Pro siaj ellaboraĵoj li estas konsiderata antaŭulo kaj profeto de la suna energio kaj fondinto de la moderna fotoĥemio; plie pioniro de la artefarita fotosintezo kaj energiotransiro al la uzado de renovigeblaj fontoj.

Li profetis la avidecon de industrioj, la disipadon de fueloj (=brulaĵoj) por superregi la mondon kaj ektimegis pro la poluado detruonta la medion.

Antaŭ cent jaroj li mortis, kaj tio, kion li antaŭvidis, estas nuna realaĵo.

En 1912 li estis invitita prelegi dum la 7ª Internacia Kongreso pri Aplikata Ĥemio en Nov-Jorko, dum kiu li denuncis la rabadan kaj senpripensan forneniigadon, nome la malŝparan uzadon de la ŝton- aŭ ter-karbo, la tiama *nigra oro*, pli poste anstataŭigita per la petrolo.

→



*Ciamician en la tempo kiam li iĝis profesoro ĉe la Studuniversitato en Bolonjo.*

Apoganto de la socia misio de la Sciencoj, kiel unua li lanĉis alarmsignalon kontraŭ la damaĝoj kaŭzotaj de la karbo kaj samtempe montris maltrankvilon pro ilia estonta elĉerpiĝo.

Ŝajnas, ke li estis rigardinta en ia kristala globo la aktualan teknikon, kiun oni utiligas por eltiri naturan gason kaj oleon el la rokoj. Li pli kaj pli parolis pri la iom-post-ioma plialtigado de la kostoj, pro la ĉiam pli enprofundiĝoj en la subteron por atingi la erc-vejnojn.

La sciencisto cerbumis por eltrovi eblajn solvojn kaj eĉ proponis ideojn tiutempe avangardajn kiuj antaŭfiguras la renovigeblajn energifontojn.

En sia referaĵo el 1912, tiel ĉi li prezentis sian vizion pri la estonteco:

*Sur la dezerta grundo ekstaros industriaj turoj sen fulgoj kaj sen kamenoj; senfina arego da vitraj tuboj kaj forcejoj el ĉiaj dimensioj leviĝos al la suno kaj en tiuj travideblaj aparatoj okazos fotoĥemiaj procezoj, pri kiuj ĝis tiam nur la plantoj estis la posedantoj de la sekretoj kaj privilegioj…*

Plej kredeble la aŭskultantaro estis ŝokita kaj impresita pri tia lia fido je la kapabloj de l' homo, elkapti rapide tiajn procezojn kiujn la naturo ellaboradas malrapide. Li tamen estis plene konvinkita pri siaj ideoj, precipe danke al sia vasta esplorado en la kampoj de organika ĥemio, fotoĥemio kaj serĉadoj pri la atomspektroskopio.

Ĝàkomo Ĉamiĉan havis grandan doton: siajn eksperimentojn, siajn sciencajn akiraĵojn li metis ĉiam je dispono de siaj universitataj studentoj, kiuj lin amegis, pro ĉi lia grandanimeco: ilia plej alta aspiro estis akiri la maksimuman voĉon, por esti premiitaj per lia subskribita foto!

Al liaj prelegoj alkuris aŭskultantoj eĉ de aliaj fakultatoj, nur pro la plezuro ĝui lian oratoran arton, dum kiu li ŝvebadis de unu argumento al alia, logike kaj racie: li pripensigis pri la nesufiĉa investado en la instrua kampo, pri la transdono de industrio al empiriaj malspertuloj, pri la scienca esplorado neglektata kaj malkonsiderata.


Lia konvinko estis, ke la sciencoj havas specialan devon socian: *"…kiu konsistas en la morala kaj materia plibonigado de ĉies sorto, ĉu riĉuloj aŭ malriĉuloj, ĉu humiluloj aŭ potenculoj – la aspirado de la sciencoj kunfandiĝas kun tiuj de l' humaneco…"*

Eminenta sciencisto kaj eminenta homo, naskiĝinta antaŭ cent jaroj, kiu rigardis ĉiam antaŭen: ĉu eble pli oportunas al ni rigardi malantaŭen al Ĝàkomo Ĉamiĉan?

*Fontoj: el Vikipedio; Partoj eltiritaj el lia referaĵo: "Fotoĥemio de l' estonteco" (1912)*

# Traitalia vojaĝo

Legante malnovajn E-revuojn aŭ ĵurnalojn, ĉiam oni povas renkonti interesajn artikolojn, kiuj legeblas facile kaj plie ebligas konatiĝon kun alitempaj esperantistoj. Dum trafoliumado de italaj revuoj el la jaroj 1950aj kaj, pli precize, de la IEF-periodaĵo *L'Esperanto*, novembro-decembro 1954, altiris mian atenton raporto pri la vizito de Tibor Sekelj al diversaj E-asocioj italaj.



Plej kredeble vi ĉiuj bone scias, kiu estis Tibor Sekelj, sed miaopinie indas refreŝigi la memoron pri tiu grava sciencisto, esploristo, mondvojaĝanto, verkisto en pluraj lingvoj kaj esperantisto.

Sendube li estis la plej grava esperantisto en la eksteresperantista mondo. Naskita en 1912, en Spišská Sobota, Slovakio, de hungaraj gepatroj, en 1988 li mortis en Subotica, Kroatio (tiam Jugoslavio).

Kio li estis?

GEOGRAFO: esploris kaj desegnis mapojn ankaŭ pri ĝis tiam ankoraŭ virgaj partoj sudamerikaj.

ĴURNALISTO: raportis pri siaj vojaĝoj kaj ekspedicioj, Esperante, hispane, serbokroate kaj redaktis la *Geografia*-n *Revuo*-n kaj *Velo*-n.


ALPISTO: konkeris montojn en Nepalo, Argentino, Meksiko kaj Afriko.

ETNOLOGO: specialiĝis pri kolektado de indiĝenaj maskoj, ĉapoj kaj instrumentoj kaj la neskribita indiĝena poezio.



MUZEOLOGO: estis direktoro de la urba Muzeo en Subotica kaj sekretario de Internacia Muzeologia Asocio.

POLITIKA AKTIVISTO: renkontis multajn diplomatojn, ambasadorojn kaj ministrojn; preparis la duan rezolucion de UNESCO pri Esperanto (1985).




ARTISTO: verkis, desegnis, pentris kaj skulptis. Mem li ilustris siajn librojn. Kiel verkisto, li aperigis librojn kiuj estis tradukitaj al pluraj lingvoj: ekzemple, *Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo* estis tradukita al trideko da lingvoj.

POLIGLOTO: konis ĉirkaŭ tridekon da lingvoj sed nur en tri li verkis.

ESPERANTISTO: ekde 1929 ĝis sia morto li restis fidela al Esperanto. Fondinto de deko da landaj E-Asocioj en Sudameriko kaj Azio kaj kvindeko da grupoj ĉie tra la mondo.

EDUKISTO: verkis lernolibrojn kaj eĉ lanĉis televidan kurson en Esperanto, en Ĉinio.

Sed ankoraŭ multon kaj multon oni povus aldoni, tial mi konsilas vin plu esplori en interreto pri tiu ĉi eksterordinara Homo.

*Parte prenita el la artikolo de ZlatkoTišljar por la Panteono de www.edukado.net*

Sed ni revenu al nia artikolo, kies titolo estas:

ĜIS LA REVIDO, ITALAJ GESAMIDEANOJ!

Prof. Tibor Sekelj faris serion da prelegoj, rilataj al konkero de monto Akonkagvo kaj la vivo en Amazonio, tra pluraj italaj urboj, inkluzive de Triesto. Post la fino de la rondirado li sendis al la redakcio de la itala revuo la suban artikolon kun siaj impresoj pri la restado en Italio. Red. de L'Esperanto

*Dum iom pli ol tri semajnoj mi vizitis dek du italajn urbojn kaj faris dek ses prelegojn, kiujn organizis la Itala Esperanto-Federacio kaj la lokaj grupoj. La organizo estis perfekta dank' al la lerteco kaj agemo de samideano Fighiera kaj aliaj gesamideanoj, kiuj direktas la Federacion, samkiel al la zorgemo de la lokaj grupoj kaj iliaj gvidantoj.*

*La vojaĝo donis al mi okazon por ĝui la belegajn urbojn plenajn je artaĵoj ĉiuspecaj kaj el ĉiuj tempoj, kaj ankaŭ la naturbelaĵojn, kiuj ĉirkaŭas ilin. La gastamo kaj la servemo de la itala popolo, kaj ĝia simpla komunikemo igis min senti hejme ekde la unua momento. Sed kio estis por mi kiel esperantisto la plej interesa, estis la kontakto kun la itala esperantista Movado, kaj kun la itala gesamideanaro.*

*En grupoj grandaj kaj malgrandaj mi estis akceptita tutkore, kaj la opaj samideanoj - la plej aktivaj - volonte oferis sin por mia gastigado kaj por la sukcesigo de la aranĝoj, kiujn mi partoprenis.*

*Tiurilate mi devas diri, ke la lokaj grupoj, eĉ se ili havas centon da membroj, fakte konsistas nur el deko da gesamideanoj, kiuj parolas esperanton, kaj kun kiuj oni povas kalkuli por ia ajn kunlaboro. La ceteraj estas komencantoj, kiuj "komprenas, sed ne kuraĝas paroli". Dum konversacio kun la gesamideanoj mi klopodis serĉi la kialon al tiu fakto, kaj mi rimarkis du kialojn. Unu el ili estas, ke la esperantistoj italaj - eĉ se ili perfekte parolas esperanton - neniam uzas la lingvon inter si. Eĉ en la grupejo ili parolas nur itale kun nur malmultaj esceptoj, kaj ili konsideras esperanton nur kiel iuspeca "studobjekto". La dua fakto estas, ke en la italaj grupoj ne ekzistas grupa vivo. La malnovaj esperantistoj klopodis enkonduki regulajn kunvenojn, sed ili faris tion tiel serioze, ke la gejunuloj forkuris. La gejunuloj, kontraŭe, insinuis la enkondukon de dancoj, pingpongo kaj aliaj ludoj, kiuj, siavice, havas nenian rilaton kun esperanto, kio kompreneble ne estis akceptita de la pioniroj.*

*Kion fari do? Ĉu la afero estas nesolvebla senfina cirklo? Mi ne kredas tion. Eble oni povus trovi la mezan vojon inter la seriozemo de la pli aĝaj kaj la amuzemo de la gejunuloj, kaj pere de tio altiri ĉiujn gesamideanojn. Kiel unu el tiaj aranĝoj mi rekomendas al ĉiuj grupoj organizi unufoje monate, je difinita tago "vivan gazeton" aŭ "parolatan ĵurnalon". Ĝi konsistas el sekvo de kvin aŭ ses mallongaj paroladoj pri diversaj temoj, kelkaj seriozaj, aliaj bonhumoraj, ankaŭ povas enhavi deklamadon de poezio, krucvort-enigmon, ŝaradon, artikolon pri novaĵoj en la movado, ktp. Unu el la avantaĝoj de tiu ĉi aranĝo estas la vigleco de la programo, kaj la fakto, ke dum la sama programo oni povas kontentigi ĉies guston. Krome, ĝi ne postulas tro grandan fortostrecon de unusola persono, sed kunlaboron de multaj. Ĝi estas tre taŭga ilo por paroligi la malkuraĝulojn, ĉar temas ja nur pri mallongaj programeroj.*

*Krom la "Viva Gazeto" la grupo povas organizi ankaŭ prelegan vesperon, kaj ankaŭ po unu amuzvesperon ĉiumonate, en kiu, krom ludi, oni povas ankaŭ muziki, kanti kaj danci. Esence tio tute ne kontraŭas esperanton. Unu dimanĉa ekskurso ĉiumonate estas bona ilo por kunligi la gesamideanojn. Modelan grupan vivon mi trovis ĉe la gesamideanoj en Trieste, kie oni ĝenerale parolas nian lingvon, kaj krom la ĝeneralaj semajnaj kunvenoj, la gesamideanoj kunvenas en pli malgrandaj grupoj kun la nomo "studrondo", en kiu ĉiu opa samideano trovas la okazon kaj la devigon praktiki la lingvon, kaj samtempe okupiĝi pri aferoj, kiuj lin persone interesas. Tamen, tiun grupo-dissplitigon mi rekomendas nur kie jam ekzistas la kutimaj semajnaj kunvenoj.*



*Kaj alia rekomendo: parolu esperante kun ĉiuj gesamideanoj. Komencu enkonduki devige tion en la klubejo, sed tamen, ne finu tie. Uzu esperanton ankaŭ surstrate, praktikante ĝin vere en ĉiuj momentoj de la vivo. Nur tiel ĝi povas fariĝi por vi natura lingvo.*

*En Bolonjo mi trovis grandan entuziasmon en la preparoj de la Universala Kongreso kaj la afero estas en tre bonaj manoj. Tiu ĉi okazaĵo devas forte revigligi la Movadon en tuta Italujo. Preparu vin, do, italaj gesamideanoj, por akcepti la Kongreson, por ĝui ĝin, kaj fine por profiti ĝiajn sekvojn.*

*Nepre vi ĉeestos multnombre en ĝi. Sed por ke en tiu grandioza manifestacio vi ne estu nuraj turistoj, sed veraj kunkongresanoj, mi rekomendus al vi profiti la restantan tempon por praktiki la lingvon, por ke via esperanto estu flua kaj internacia.*

*Permesu al mi fari kelkajn rimarkojn rilate la erarojn, kiujn fremdlandano povas rimarki ĉe la italaj gesamideanoj. Tion ja nepre eksterlandano devas fari kaj mia celo ne estas kritiki, sed plibonigi.*

*Antaŭ ĉio, klopodu diferencigi klare la elparolon de la literoj '**s**' kaj '**ŝ**'. Ĉar vi rekonos, ke ne estas la sama afero, ĉu vi estas amanto de la stelo, aŭ de la ŝtelo. Kaj se la kasistinon de la grupo vi nomas 'kaŝistino', se ŝi ne komprenas ŝercon, ŝi povas ofendiĝi.*

*Ne uzu la vortojn 'ecco', 'dunque' kaj 'ma', ĉar ili ne ekzistas en esperanto. Anstataŭ ili vi povas trankvile diri 'jen', 'do' kaj 'sed'. Ĉiu esperantisto komprenos vin.*

*La itala vorto 'quasi' estas tradukenda per 'preskaŭ' kaj la esperanta 'kvazaŭ' signifas 'come se fosse' (*=kiel se tio estus*). Bonvolu ne intermiksi ilin.*

*Se iu proponas al vi donacon, ne diru, ke vi volonte 'aĉetas'* (laŭ la itala vorto, accettare) *ĝin, ĉar li povas ofendiĝi. Diru prefere, ke vi 'akceptas' ĝin.*

*La itala vorto 'invece', ofte uzata en la itala, preskaŭ ĉiam estas tradukebla al esperanto per 'kontraŭ'. Kelkfoje ĝi signifas 'anstataŭe', sed neniam 'anstataŭ'. Tiu ĉi lasta en la itala estas 'invece di'.*

*Bonvoli ne paroli 'frue', sed 'ĝustatempe'. Estu via celo paroli esperanton 'flue'. Certe tion signifas la vorto 'presto' en tiu ĉi kazo.*

*Kaj estu vere tiu la celo. Sed la fluecon oni atingas pere de konstanta ekzercado de la lingvo. Parolu ĝin ĉie kaj ĉiam kun la gesamideanoj, ĉar via lingva nivelo influas multe en la prestiĝo, kiun la itala samideanaro ĝuas antaŭ la eksterlandanoj.*

*Kaj iun aferon pluan: uzu ĉiam la verdan stelon. Mi renkontis multajn gesamideanojn, kiuj "lasis sian stelon sur la alia jako". Ĝi estas ne nur via distingilo, sed ankaŭ ĝi donas multege da okazoj, kiam oni demandos vin en la tramo, en la lernejo aŭ en la laborejo pri la signifo de la verda stelo, fari vian propagandan prelegeton kaj varbi novajn anojn por nia afero.*

Tibor SEKELJ

Tre plaĉa, tre sincera kaj ankaŭ tre verdira artikoleto, ĉu ne? Ĉu eble ankoraŭ iom aktuala? Mi havas simpatian memoraĵon pri li, kiam kun grupo da triestanoj mi vizitis iun aranĝon en eksa Jugoslavio, tio estis ĉ. je la duono de la 1970-aj jaroj. Ankaŭ Tibor Sekelj partoprenis en ĝi. Dum iu vespera kunveno li iradis de unu tablo al alia, por alparoli konatojn kaj, ĉefe, nekonatojn. Mi, tiam ne plu komencanto sed nur timanta malĝuste paroli, estis kune kun miaj samlingvanoj, kaj do la konversacio disvolviĝis 'krokodile'! Tion ĉi li rimarkis kaj ĝentile alparolis nin, dirante: "Ho, ĉu vi ne scias, ke, kiam diverslingvanoj renkontiĝas, estas malpermesite paroli propran nacian lingvon?" Mia vizaĝo ruĝiĝis de honto kaj nenio eliĝis el mia eksekiĝinta gorĝo: bonŝance helpis min triesta samideano, kiu klarigis, ke jes, ni scias, ke ni devus paroli esperante, sed vidu, ili ĉiuj estas komencantoj kaj…". Je ĉi punkto Tibor Sekelj haltigis la propetanton kaj kun rideto surbuŝe kontraŭdiris: "… ĝuste en kunestado kun alilandanoj oni devas profiti por ekliberiĝi de timo erari, ĉar neniu el ni, en ĉi rondo, estas denaskulo, por ĉiu esperanto estas la dua lingvo, kaj jen la plej bona momento por ĵeti malantaŭ la ŝultrojn ĉian timon kaj … ekparoli esperante!"

Neniam mi forgesos tiun momenton, dankegon pro tiuj konsiloj, kara Tibor! ***E.D.***

## Ĉi-vespere bongusta plado da lokustoj!

Lokusto eniras ankaŭ nian menuon: fine de la pasinta jaro, la eŭropa komisiono rajtigis la enigon en la komunan Merkaton de dua insekto: temas pri la migra lokusto *(Locusta migratoria)*, post la jam aprobitaj raŭpoj de la faruntineoj (*Tenebrio molitor*).

La lokustoj aperos sur la bazarbretoj frostigitaj, sekigitaj aŭ pulvorigitaj. Ilin oni utiligos kiel intermanĝetoj akompane de aperitivo aŭ kiel ingrediencoj de manĝaĵoj.

Tiu enkonduko en nian nutroĉenon estis science taksita de ***Efsa***, nome la eŭropa aŭtoritato pri nutrad-sekureco, kiu konkludis ke tiuj insektoj ne estas malavantaĝa manĝaĵo rigar-



data de la nutra vidpunkto, nek danĝera por la konsumantoj. La produktaĵoj entenantaj lokustojn, tamen, devos surhavi informetikedojn pri la risko de eblaj alergiaj reagoj, por personoj ĉe kiuj jam aperis maltolerecoj al krustacoj, akaroj kaj/aŭ moluskoj.

Do, ĉi tiu insekto aldoniĝas al la listo pri la novaj rajtigitaj ingrediencoj, zorgita de la eŭropa komisiono. Laŭ ties normaro estas difinitaj *novingrediencoj* ĉiuj nutraĵoj, kiuj ne estis larĝe uzataj en Eŭropo de antaŭ majo 1997. Por esti surmerkatigitaj, la proponitaj produktoj devas ricevi unuope la koncernan aprobon. Ĉar la insektoj estas proteinoriĉaj, ilia eniro en niajn manĝkutimojn povus plifaciligi la transiron al nutrosistemo pli medioprotektanta, kun grandaj profitoj por ĉiuj.

*https://ilfattoalimentare.it/*
*Adaptis kaj tradukis E. Doerfler*

Do, se tiel estos, kial ne jam nun eklerni, kiel ilin pretigi por surtabligo, eĉ antaŭscii, kiel tiuj lokustoj manĝeblas kaj krome, kie eblas tiujn aĉeti. Nu, por kontentigi onian scivolemon, jen du receptoj. Tamen, antaŭ ol prepari la manĝon, ja sciendas, kiom da personoj partoprenos en la komuna gustumado por aĉeti la sufiĉan kvanton.

***Lokustoj kun lardo***

*Ingrediencoj*

- 1 porcio da lokustoj
- Akacia mielo kun papriko
- Timiano
- Lardo

Porcion da lokustoj, sen flugiloj kaj kruretoj, fritetu kun la akacia mielo spicita per papriko kaj timiano. Rostetu ĝis brunetiĝo kaj envolvu la lokustojn en lardajn tranĉaĵetojn. Fritetu la rulaĵetojn dum 2-3 minutoj kaj tuj frandu ilin.

***Rostostangetoj el lokustoj***



*Ingrediencoj*:

- 1 porcio da lokustoj
- Oleo
- Ajlo
- Rosmareno
- Salo
- Metalaj aŭ lignaj rostostangetoj

Por ĉi recepto oni devos havi la rostostangetojn, sur kiujn meti la ĝustan porcion da lokustoj, senflugiligitaj kaj senkruretigitaj. Enmetu en paton iom da oleo, fritetu la ajleron haketitan kaj dispecigitan rosmarenon, fine la rostostangeton kun la lokustoj. Gustumu ilin varmaj. Bonan apetiton!

Kompreneble antaŭ ol sendi invitilon al viaj gastoj, konsilindas viziti retejon, kiu vendas la bezonatajn lokustojn, kie verŝajne oni trovos ankaŭ informojn pri la diversaj tipoj de manĝeblaj insektoj.


Mi vizitis nur du el tiuj retejoj, sed je dispono troveblas multegaj!

www.insetticommestibili.it/department/2/confezioni-insetti-15-gr.html aŭ
www.peganto.it/insetti-commestibili-il-cibo-del-futuro

# E-Kvartalo en Meksiko

El Nova Sento, reta periodaĵo de Itala E-Federacio, zorgita de Norberto Saletti, mi ŝtelis la jenan informon: en *vizaĝlibro* (=fejsbuko aŭ facebook) brazila amiko Juan Carlos sciigis ke,"en mia denaska urbo, Ciudad Juàrez, en Meksiko, estas kvartalo kiu nomiĝas Esperanto kaj la stratoj havas esperantajn vortojn kiel nomoj. Jen la bildoj!"

Vi povas vidi tion ĉi ankaŭ per la suba ligilo. Tiulande realiĝis la revo de multaj esperantistoj.




https://www.google.it/maps/@31.671383,-106.4055323,16.29z?hl=it




Photo/Foto : Eduardo Alvarado

# Tiel oni iam ridis!
# Ni ridu, ridu, ridu!!!!

## Mark Twain aĉetas libron

La konata amerika spritulo-verkisto iam iris en librovendejon en Nov-Jorko por aĉeti al si libron. Ĉar li deziris ricevi ĝin kiel eble plej malmultekoste, li faris la aferon jenmaniere:

"Kiom kostas ĉi tiu libro?" li demandis la vendiston.

"Kvar dolarojn, sinjoro", estis la respondo.

"Sed kiel gazetfakulo mi havas rajton pri rabato, ĉu ne?"

"Certe!"

"Krome mi estas verkisto; ĉu pro tio mi ricevas plian rabaton?"

"Kompreneble!"

"Cetere, mi estas ankaŭ kunlaboranto de ĉi tiu firmo; sekve de tio mi ja rajtas pretendi specialan rabaton, ĉu ne?"

"Tio estas komprenebla per si mem!"

"Nu do, por ke vi fine eksciu ĝin: mi estas Mark Twain. Ĉi tiu fakto sendube certigas al mi plian rabaton, ĉu ne vere?"

"Tutcerte, sinjoro Twain!"

"Do, kiom la libro nun kostas?"

La vendisto streĉe kalkulis kaj fine diris:

"Neniom, sinjoro Twain, kontraŭe, ni ŝuldas al vi okdek cendojn."

*(trovita en la revuo* Esperanto*, el la 1910aj jaroj)*

Noteto pri tiu ĉi tre ŝatata (ankoraŭ nuntempe!) aŭtoro, legita en Vikipedio.

**Mark Twain kaj Esperanto**

Kiam al tiu ĉi mondfama aŭtoro S. L. Clemens, nomata Mark Twain, skribis tradukinto de lia bonhumora rakonto, petante permeson publikigi la tradukon, estis ricevita jena, angle skribita, respondo: „Se mi estus pli juna je kelkaj jaroj, mi lernus tiun lingvon. Eventuale mi lernus ĝin eĉ nun, se mi estus certa, ke ĝin parolas la anĝeloj."

**El la retejo de Donald J. Harlow**

*"Mark Twain", plumnomo de Samuel Langhorne Clemens, estas eble la plej konata usona verkisto. Li verkis pliparte dum la lasta duono de la 19a jarcento. Liaj verkoj estis ofte satiraj, kaj ĝenerale montris ian bonan komprenon -- kaj malestimon -- pri siaj samlandanoj. Liaj plej konataj romanoj estis verŝajne:* Konnktikuta Jankio en la Kortego de Reĝo Arturo*;* La Aventuroj de Tom Sawyer *kaj* La Aventuroj de Huckleberry Finn*. Tiu lasta romano estas tutmonde konata.*

http://literaturo.org/HARLOW-Don/Esperanto/Literaturo/literaturo.html

### *Sercaĵoj tradukitaj de Viglo*

**Paradizo kaj infero**

Post longa kaj kuraĝa vivo, brava samurajo alvenis al paradizo. Li estis tre scivolema kaj petis rapide pririgardi ankaŭ inferon: anĝelo kontentigis lin. Li troviĝis en vastega salono havanta en la centro tablon preparitan kun pladoj plenplenaj de bongustaĵoj. Sed la kunmanĝantoj, cirkaŭe sidantaj, ĉiuj estis skeletaj, mortkoloraj kaj malfortiĝintaj.

«Kiel eblas, fronte de ĉiu tiu abundaĵo?» demandis la samurajo.

La anĝelo klarigis: «Por enbuŝigi la manĝaĵon, ili disponas pri unu metron longaj manĝiloj, kiujn oni rigore devas preni nur je la ekstremaĵoj».

Tute tremanta pro tiu terura puno, li petis tuj iri al la paradizo.

Kun maksimuma miro, li trovis tute identan scenon: sennombrajn homojn sidantajn cirkaŭ longa tablo, egalan vicon da delikataĵoj kaj same longajn manĝilojn per ekstremaĵo prenendajn. Male, la samtablanoj estis ridetantaj, gajaj kaj bonnutrataj.

«Kiel eblas?» li demandis la anĝelon.

Tiu respondis: «En la infero, ĉiu ŝtreciĝas kapti la manĝaĵon por ĝin manĝi, samkiel li dum sia tuta vivo ĉiam estis farinta. Kontraŭe, ĉi tie ĉiu prenas la bongustaĵon per propraj manĝiloj kaj ĝin enbuŝigas al la najbaro».

Paradizo kaj infero estas en viaj propraj manoj. Jam nun.

**Triesta Humuro!**

Ĉimatene, irante laŭ la Granda Kanalo, mi preterpasis du sencerbuletojn kaj aŭdis unu el la du, diri al la alia.

"Hej, Joĉjo, kiel direblas, en eŭroj: *eĉ ne UNU lireton mi havas?*"

"Sed kion vi diraĉas, Tonĉjo? Ĉu vi plenstultuliĝis? Simplas: *eĉ ne unu eŭron mi havas*."

Kaj la alia:

"Ĉuuu?? Nu, tio signifas, ke mi estas ege malriĉa. Mi opiniis, ke tio egalas al nur duona milono…..?!?"

**Atentigo!**

La sidejo de Triesta Esperanto-Asocio, via del Coroneo 15, triaetaĝe, estas malfermita:

* ĉiumarde, de la 18a ĝis la 20a horoj: Unuagrada kurso de Esperanto. Kiu deziras refreŝigi siajn sciojn, estas bonvena.
* Ĉiuvendrede, de la 19a ĝis la 21a horoj: ni atendas vian viziton.
* Vendredon la 16an de decembro, ekde la 19a horo:

Naskiĝdatreveno de nia Majstro




*Franca foto-poŝtkarto el 1908*

Ĵaŭdon la 15an de decembro 2022 estos la Naskiĝ-datreveno de nia kara Majstro.
Vendredon la 16an ni atendos vin en la TEA-sidejo por kune rememori tiun gravan daton!

## Solvo de Cerbotiklilo de Viglo

publikigita en la n-ro 163 de **TB**.

Tiam Viglo demandis: kiu el la kvar grupoj da geometriaj figuroj ensteliĝis, laŭ logika kriterio? Jen sube la 4 grupoj.





**Solvo** Ĉu vi elektis la grupon **C**, ĉar tie ariĝis 3 malsamaj bildoj? Eraro, grandioza eraro! La kaŝe entrudiĝinta grupo estas tiu **A**.

Fakte, ĝi estas la ununura grupo, kie la latersumo de la bildoj (2 kvadratoj + 2 trianguloj) egalas al **14**, nome 2x4=8 + 2x3=6.

En ĉiuj aliaj grupoj, la bildlateroj sumas entute 15.

**B** 3x3=9 + 6= 15 **C** 2x3=6 + 4 + 5 = 15
**D** 3x4=12 + 3 = 15

Bedaŭrinde neniun solvon **TB** ricevis, tial la bela donaco restas ĉe la redaktanto.




**Stereotipaj, diversnaciaj moroj:**

Germano trinkas bieron; Anglo sportludas; Italo manĝas makaroniojn; Hispano fumas; Ruso glitadas; Franco amindumas!

Ha, haa, haaa! (*Poŝtkarto el 1912)*

**Bonan Kristnaskon 2022an kaj Pacan 2023an Jaron al la TEA-anoj kaj Gelegantoj deziras Triesta Esperanto-Asocio!**




*Arkivo de James Rezende Piton*

**BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO ETS-ODV**
**Redaktanto**: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
**Sidejo/Poŝta adreso**: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste
**Kunventagoj:** marde 18-20; vendrede 19-21
**Tel**: (+39) 392 2860685 - 040 350093; 339 2226936
**Banka Konto**: Unicredit - IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439
**Reto**: esperantotrieste@gmail.com nored@tiscali.it
**Asociaj ttt-ejoj:** www.esperantotrieste.altervista.org; www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org